

la naska fasko

Numero ok
2009-07-08
merkredo

La ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

Kio okazos hodiaŭ?

★ posttagmezo: libera

Se vi ne iris al La Jolla hieraŭ kaj volas gvidanton, petu al Hoss, ĉar eble li iros.

★ 7:30 pm: prelego: **Hodler en Mostar**

Kie: komuna ĉambro en Cuzco

(Vidu priskribon sube)

Hodler en Mostar

Ĉi-vespere profesoro Spomenka ŠTIMEC parolos al ni pri sia libro *Hodler en Mostar*. En la fokuso de la libro estas la vivo de la patro de Hector HODLER, Ferdinand HODLER, fama svisa pentristo. Hector, lia filo, estis la junulo kiu en 1908 fondis Universalan Esperanto-Asocion.

Hector pozis al sia patro kiel modelo ekde la plej frua junaĝa tempo kaj estas trovebla sur multaj verkoj pentritaj de Ferdinand HODLER. Sed al la patro pozis ankaŭ multaj belaj modelinoj, inter kiuj elstaras Jeanne CHARLES, la modelo tre amata de Ferdinand HODLER. Ni ekscios kiu estas Jeanne kaj kial ŝia vivo gvidis de Svilando al la bosnia urbo Mostar.

La libro pri HODLER (la patro kaj la filo), estas libro pri la amo kaj la arto, pri Esperanto, pri militoj... La libro invitas vin koni pli bone la historion de Esperanto, koni pli bone la pentroarton de Ferdinand HODLER kaj esti detektivo pri du forrabitaj pentraĵoj de li.

Belgujo kaj la cifero 3

de Eduard KUSTERS

Belgujo havas proksimume la formon de triangulo. Ni havas 3 grandajn najbarajn landojn: en la nordo Nederlandon, oriente Germanujon kaj sude Francujon. La akra pinto de la triangulo tuŝas la marbordon de la Norda Maro. Ni havas 30 kilometrojn da marbordo kun agrablaj, larĝaj strandoj. Estas logike ke multaj belgoj dum la somero ferias tie. Belgoj? Jes, ekzistas proksimume naŭ milionoj (3×3) da belgoj: kvin milionoj da flandroj en la nordo de la lando, 3 milionoj da valonoj en la sudo kaj unu miliono da bruselanoj en la mezo de la lando, cirkaŭita de flandroj.

Nia pli ŝatata manĝo estas terpomfritoj kun mituloj aŭ bifstekoj. Ĉiu regulo havas escepton. Tio validas por niaj bieroj: ni havas multe, multe pli ol 3 specoj da bieroj. Eble 300 sed mi ne estas certa. Ni havas 3 lingvojn: la nederlandan (nuntempe



La NASKa Fasko

oni diras ankaŭ la flandran), la francan kaj la germanan.

Nun la plej grava afero: Belgujo aŭ la belgoj havas 3 problemojn:

1. Religio-problemon: ĉefe inter romkato-likoj kaj nekatolikoj
2. Lingvo-problemon: precipe inter la nederlandparolantoj kaj la francparolantoj
3. Problemon pri partigo de la disponebla prospero.

Nur la lasta validas por ĉiu lando aŭ nacio. Speciale por Belgujo estas la mikso de problemoj. La Belgoj plialtigas la mikson de la 3 problemoj ĝis nekonatan arton.

Ekzemple: la reĝo Leopoldo III estas francparolanto kaj katoliko. Dum la lasta mondmilito li havis tro da simpatio por Germanujo. La valonoj—francparolantoj sed ne katolikaj—sufervis multe pli ol la flandroj dum la milito. Post la milito ili volis ke la reĝo abdikis. La flandroj—en tia tempo ege katolikaj—volis ke li restu kvankam li parolis la francan. Kiel ĉiam la belgoj ne volas batali. Ili celis kaj trovis kompromison. La reĝo abdikis kaj lia filo estas elektita kiel nova reĝo.

Nuntempe oni miksas la du lastajn problemojn. La flandroj plendas ke ili multe pli laboras ol la valonoj do ili volas havi pli de la disponebla prospero. Oni rekonas la problemojn de Kroatujo en eks-Jugoslavujo. Ni solvis iomete la problemon per kreado de 3 novaj institutoj. 3 Regionoj: Flandrujo, Valonujo kaj Bruselo. Sed regiono kaj lingvo ne ĉiam estas konformaj. Do samtempe oni kreis 3 komunumojn: nederlandlingvan, franclingvan kaj ger-

manlingvan. Ĉiu havas parlamenton kaj prezidenton. Kaj la belgoj elektas delegitojn por ĉiu parlamento. La problemo estas nuntempe ke oni ne trovas sufiĉe da taŭgaj kandidatoj. Ĉar samtempe ni restas havi la federacion Belgujo.

Eble vi ne komprenas ĉion de la organizado. Ne gravas, ankaŭ ni ne. Sed tamen estas agrable vivi en nia kara kompleksa lando.

Komencantaj aventuroj en Sandiego

(aŭ: kie estas mia vortaro?)

de Harold GOODMAN

Kiam mi ĵus alvenis al Sandiego mi troviĝis en la flughaveno. Pro tio, ke me finfine atingis mian celon, la usona esperanta ĉefurbo, mi decidis tuj uzi la internacian lingvon.

Mi alproksimiĝis taksian ŝoforon kaj ĝentile petis lin: “Sinjoro. Ho, mi penis...”

Lia vizaĝo tuj ruĝiĝis kaj li furioze batis mian kapon kaj angle ekkriis, “Strangulo!” Ĉu eble li ne bone komprenas la internacian lingvon?

Do duan fojon, kun granda rideto mi redemandis: “Sinjoro, Ho, mi penis...”

Preskaŭ tuj li rompita duonon de miaj dentoj. Ĉu eble li estis volapukisto?

Do, mi demandis al alia persono: “Ĉu vi parolas la internacian lingvon Esperanto?”

Li rigardis min kaj murmuris angle mallaŭte: “Mi ne parolas la hispanan.” Li ankaŭ ekkriis kaj policisto alvenis por helpi. La policisto kondukis min el la flughaveno en

polican veturilon. Evidente, finfine ili komprenis ke taŭgas ricevi la esperanto-parolantajn vojaĝantojn kun amikeco kaj ŝatateco.

Post unu horo la veturilo haltis apud la registara enmigrada oficejo. Ĝi estis fermita ĉar Kalifornio bankrotis. Sed, unu el la antaŭaj enmigraj policistoj estis tie, do, la loka policisto petis lin helpi.

La enmigra policisto laŭte angle ordonis al mi: “Montru vian pasporton!”

“Mi ne havas pasporton ĉar mi estas...”

Mi volis diri, “...ĉar mi estas usonano,” sed tuj li diris al mi:

“Ho, vi ne havas pasporton! Evidente, vi estas malleĝa ulaĉo!”

Mi protestis sed neniu helpis min.

(daŭrigota en venonta numero de la Fasko)

Volapukaĵo... kaj idaĵo

de Richard ANDERSON-CONNOLLY

Se oni iros al la retpaĝo de la aperta kaj senpaga vortaro <<http://wiktionary.org>> oni trovos ke Volapuko havas pli da difinoj ol Esperanto. Ĉu vere? Jes, la retpaĝo listigas volapukon kiel lingvon kun pli ol 10 000 vortoj kaj Esperanton kun pli ol nur 1 000. Krome—kaj preskaŭ nekredible—Ido havas pli ol 100 000! Fakte, Ido havas specialan lokon sur la retpaĝo kiel unu el la 10 plej grandaj lingvoj.

Ĉu tio ĉi estas tolerebla situacio? Eble ne multe gravas. Sed se vi volas konkursi kontraŭ niaj parencoj, Volapuko kaj Ido, do iru al *Wiktionary* kaj nepre aldonu vortojn. (Sed oni devas havi konton.) Bonan difinadon!

Frankonio

de Uwe MEYER (kiu loĝas apud Würzburg)

Multaj eksterlandanoj, kiam ili pensas pri Bavario en la sudoriento de Germanujo, vidas en siaj mensoj imagojn de la Alpoj, de kasteloj konstruitaj de la reĝo Ludoviko la 2-a (1845–1886) kaj eble ankaŭ de la ĉefurbo Munkeno. Ĉi tiuj sendube belbelaj vidindaĵoj estas ĉiuj en la sudo de Bavario. Tamen la lando, kun pli ol 70 000 km² la plej granda en Germanujo, prezentas an-



Katedralo en Würzburg. Christian HORVAT/Wikimedia

La NASKa Fasko

koraŭ multe pli al vizitantoj. Ekzemple Frankonion.

Ĉi tiu regiono en la nordo de Bavario kovras 23 000 km². Fariĝinta bavara en la frua naŭdeka jarcento, Frankonio ankoraŭ nun havas siajn proprajn dialektojn, kutimojn kaj naciecan senton. Kelkaj ekzemploj sufiĉu. En la sudo de Bavario oni preferas bieron, en Frankonio oni produktas bieron kaj vinon. Dum la sudo de Bavario estas katolika, Frankonio prezentas sin kiel miksaĵon de katolikaj kaj protestantaj distriktoj. Kaj kiam frankoj parolas kun germanoj kiuj ne loĝas en Bavario ili emas emfazi ke ili ne estas bavaroj, sed—evidente—frankoj. Samtempe oni ĉiam volonte profitis de la sukcesa ekonomia evoluo de tuta Bavario ekde la dua mondmilito...

Do, ĉu oni povas fari ankoraŭ ion alian en Frankonio kiel turisto krom pensi pri ĉio kio disigas aŭ unuigas popolojn? Jes, ja! Venu viziti la barokan kastelon (germane: *Residenz*) de Würzburg, kiu troviĝas en la listo de la Monda Kulturheredaĵo de UNESKO. Promenu en Bamberg kaj Rothenburg, bone prezervitaj urboj karakterizitaj de la Mezepoko. Rigardu la pentraĵojn de Albrecht DÜRER (1471-1528) kaj de Lucas CRANACH la pli maljuna (1472-1553) en Nürnberg aŭ de Carl SPITZWEG (1808-1885) en Schweinfurt. Aŭskultu mondfamajn muzikistojn kiel Cecilia BAR-

TOLI aŭ Lang LANG dum la somera muzikfestivalo en Bad Kissingen, belega kuraĉloko kiun iam frekventis la eŭropa nobelaro. Se vi havas multe da tempo, vi povus ankaŭ mendi bileton por la WAGNER-Festivalo de Bayreuth (kaj iri tien kelkajn jarojn poste).

Aŭ kial ne esplori per ŝipo la riveron Majnon kiu fluas de oriento al okcidento tra Frankonio? Ĉi tiu plezuro estas havebla sen longe atendi. Preterpasu la domon kie Wilhelm Conrad RÖNTGEN malkovris la rentgen-radiadon, supreniru unu el la komfortaj ŝipoj kiuj ankras ĉe la piedo de la giganta mezepoka fortreso de Würzburg. Kaj ne forgesu eliri en Miltenberg, preni aŭtomobilon kaj veturi suden ĝis la romantikaj ruinoj de la kastelo Wildenberg, kaŝita en la Odenwald, granda arbaro preskaŭ netuŝita. La lastajn du kilometrojn vi devos grimpi la monton ĝis vi alvenas tie kie, verŝajne, Wolfram von ESCHENBACH en la komenco de la dektria jarcento verkis almenaŭ parton de sia *Parzival*, unu el la plej gravaj eposoj de la germana mezepoka literaturo. Poste vi povus refortigi vin manĝante la plej bonajn rostkolbasojn de nia planedo en unu el miloj da tradiciaj gastejoj. Tiom da ebloj, ĉu ne?

Do, Frankonio atendas vin (aparte en ĉi tiuj tempoj de ekonomia krizo). Venu je granda nombro.

La NASKan Faskon redaktas via afabla helpinstruisto Hoss, sed **li nepre bezonas vian helpon!** Ne timu, se vi ne sentas vin komforta pri verkado; Hoss helpos vin korekti kaj poluri. Ĝuste nun li *senpacience* kaj *avide* atendas viajn kontribuojn—ĉu fotojn, desegnaĵojn, artikolojn, poemojn, amo-leterojn... kion ajn. Sendu viajn materialojn perrete al **<nask.esperanto@gmail.com>** aŭ portu ilin piede al Asante#127.